Aŭstraliaj Esperantistoj

Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale
PLENUMITA 10/09/2020 Kvarcentnaŭdekkvina eldono (unua eldono 20/09/2011)

Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

Uzindaj ligoj *reta-vortaro* *Freelang Vortaro* *Plena Ilustrita Vortaro* *Duolingo*
Google Translate *Pasintaj AE eldonoj* *duolingo entute* *lingvohelpilo*
Esperanta Retradio *Esperanta himno* *PMEGramatiko* *openclipart.*

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

★★★

★★★

https://www.greanvillepost.com/2020/09/03/why-china-and-the-united-states-must-have-a-war/

Kontraŭ misilo kostas $1,500,000 (*Patriot 3*)
Ordinara atakmisilo kostas $500,000 kaj falsa misilo kostas ĉu $10,000
Por esti certa oni devas uzi almenaŭ tri defendajn misilojn $4,500,000
Do nur 3 falsaj misilojn (ĉu $40,000) tiam la defendaj misiloj kostus ĉu $13,500,000
Oni povas inter unu vera misilo sendi 10 falsajn misilojn kiuj kostas $600,000.
Granda Aviadilportanta ŝipo kostas $13,500,000,000. *Roger Springer*

★★★

Esperanto estas Aglutina lingvo, la plej larĝe aglutina. La plej komunaj aglutinaj kunmetaĵoj estas tiuj, kie oni kungluas substantivon kun sia prepozitivo, ekz. el “La kunveno de la estraro” venas “La estrarkunveno”. Krom la kutimaj reguloj por fari aglutinan kunmetaĵon, nome ke la substantivo venas kiel ĉefelemento laste, ke nenio troviĝas inter la du elementoj, ke la prepozicio kutime forfalas sed tenas sian signifero en la kunmeto, kaj ke eventualaj adjektivoj difinas nur la ĉefelementon, krom tioj la antaŭa prepozitivo devas havi ĝeneralan sencon. Ekz. “tablotuko” estas tuko por ĉiuj tabloj, kaj ne eblas la kunmeto “rondtablotuko”.

Ekzistas tamen kunmetaĵo per kiu ni povas aldoni specifaĵon, adjektivon, al la flankelemento, sed tiaj kunmetaĵoj ne estas aglutinaj kaj kreas du vortojn. Ĝi enhavas la neaglutinan kunmetadon de substantivo kun sia adjektivo, ekz. “malvarmakva naĝejo” el “naĝejo de (kun) malvarma akvo”. Tiajn kunmetojn oni ne povas fari aglutine, ĉar la prepozitivo “de malvarma akvo” ne estas ĝeneralsenca, pro la adjektivo “malvarma”. Ili iomete ekzistas en etnaj lingvoj. La regulo por tiaj kunmetoj de substantivo kun sia adjektivo tamen estas, ke la kunmetaĵo povas ekzisti nur kiel adjektivo, ekz. “malvarmakva”, kaj neniam kiel substantivo (*”malvarmakvo”). Aŭ kiel adverbo kun sia verbo: “fortlabore sukcesi”, sed ne *“fortlabori”.

Dum la flankelemento de aglutina kunmetaĵo devas havi ĝeneralan sencon, la kunmetaĵo de substantivo kun sia adjektivo estas specifa. Jen kelkaj ekzemploj: tablotuko kaj rondtabla tuko; dompordo kaj midoma pordo; manlaboro kaj fortmana laboro; pordŝlosilo kaj tiuporda ŝlosilo; manĝtempo kaj matenmanĝa tempo; vojaĝkunulino kaj longvojaĝa kunulino. *Marcel Leereveld*.

★★★